

BOLETÍN[★]

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

XXXVI HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

AKCEPTO EN LA URBODOMO DE EL FERROL



La urbestredzino donacas floran bukedon al
la edzino de la Prezidanto de nia Federacio

BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Directora: Doña Carmen Payá Mira
Dirección y Administración: Oficina Central - Rodríguez San Pedro, n° 13, 3° n° 7 - Telf. (91) 446 80 79 - MADRID-15.
Redactor Jefe: Don Salvador Aragay Galbany - Bassegoda, 40 Telf. (93) 240 14 28 - BARCELONA-14.
Comité Provisional de Redacción: D. Liberto Puig, D. Giordano Moya, D. Vicente Hernández, D. Gabriel Mora Arana, D. Pedro Nuez, D. Luis Izaguirre, D. Rafael Herrero y D. Juan Devís.

ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Centra Oficejo:

Srt. Rodríguez San Pedro, 13 - 3°, 7
Teléfono (91) 446 80 79

MADRID-15

Prezidanto:

S-ro Angel Figuerola Auque
Str. Víctor de la Serna, 19 - 7°

MADRID-16

Sekretario:

S-ro José M^a González Aboín
Centra Oficejo

Kasisto:

S-ro Gerardo Flores Martín
Str. Presidente Carmona, 2 - 8°

MADRID-20

H.E.F.—Ĉekkonto: N° 8.362-271

Banco Español de Crédito
Str. Diego de León, 54

MADRID-6

Libroservo de H.E.F.:

S-ro Félix Gómez Martín
Centra Oficejo

Informa-servo de H.E.F.:

Centra Oficejo

Eldona Fako:

F-ino Inés Gastón Burillo
P° Marina Moreno, 35 - 4°

ZARAGOZA

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Se ruego a todos los asociados que aún no hayan satisfecho sus cuotas del corriente año 1976, remitan el importe de las mismas por giro postal directamente al Tesorero (Gerardo Flores, Avda. del Presidente Carmona, núm. 2, Madrid-20), o bien, a nombre de la Federación Española de Esperanto, por giro postal o transferencia bancaria, a la cuenta corriente núm. 8.362-271 en el Banco Español de Crédito (Diego de León, núm. 54, Madrid). Se insiste en que la cuenta está a nombre de la Federación, no del Tesorero. No conviene utilizar talones o cheques, por los elevados gastos que, en proporción, originan; pero, de utilizar este medio de pago, los talones deberán extenderse a nombre del Tesorero. Muchas gracias.

Gerardo Flores, Kasisto de HEF

36^a hispana kongreso de esperanto

En el Ferrol, la 21-an de julio, oni unue disdonis la dokumentojn al proksimume ducent kvindek partoprenantoj en la sidejo de la Kongreso "Colegio Tirso de Molina".

La Kongreso fakte komenciĝis per la Sankta Meso kun esperanta prediko fare de la karmelana pastro Patricio de Fuentes y de Valbuena en la Preĝejo de "RR. PP. Mercedarios". En sia prediko, post sciigo, ke li estas nova esperantisto, li salutis la Galegan regionon kaj la urbon El Ferrol; li menciis, ke tiu ĉi urbo, je la komenco de nia jarcento, estis sidejo de kongreso pri paco, kaj ke nun, en nia 36-a Hispana Kongreso de Esperanto, leviĝas la verda standardo de Esperanto kaj por la unuiĝo de la Homaro kaj por la paco.

"Estis ĝuste krei taŭgan lingvon por la paco, pro amo al la paco. Se oni deziras la pacon, oni devas labori por ĝi. Pro tio naskiĝis Esperanto, ĝi necesigas nian agadon kaj responde nia epoko necesigas nian lingvon".

Pastro P. Fuentes de Valbuena analizis la esperantismom el diversaj vidpunktoj: kultura kiel lingvo; etika, socia kiel ilo de paco, kaj ankaŭ kiel montrilo de agado. Li rimarkis, ke je la fino de la lasta mondmilito, kiam venis la armistico, ne alvenis la paco, kaj hodiaŭ ĝi ne estas stabila kvankam oficiale neniu estas kontraŭ la paco.

"Por vera paco, Zamenhof proponis al la homoj la interkompreniĝon. La paco devas esti rezulto de la justeco, de ordo naskiĝanta de lapropranaturato, sed justeco ne suficas, oni bezonas la karitaton, la amon naskita de la konscio.

Natura egaleco per supernatura ordo faliĝas la barojn.

La paco estu kun ni pro la Sinjoro, princo de la paco. Li garantias la pacon; benataj estu la pacigantoj.

Samideanoj: Mi volas per versoj de la poemo "La Vojo" montri rimedon kontraŭ la pesimismo. —Ni semas kaj semas, neni-am laciĝas. L'espero, l'obstino kaj la pacienco, ni paŝo post paŝo, atingos la celon en gloro—. Post la Sankta Meso kaj en la salono de la "Colegio de Tirso de Molina" okazis la oficiala inaŭguro.

S-ro González Aboín, sekretario de HEF, parolis unue por transdoni la parolon al S-ro José Tojeiro Piñón, Vicprezidanto de la Loka Komitato. Li salutis je la nomo de la Loka Komitato kaj de la urbo El Ferrol la gekongresanojn, kiujn deziris bonvenaj al Galegio, kaj deziris, ke la Kongreso estu fruktodona: "Mi esperas, ke en la proksima kongreso denove mi renkontos vin. Mi deziras, ke la aranĝoj de la kongreso estu plaĉaj al vi, se ion ajn vi ne trovus tia, pardonu nin; ni enmetis la plej grandan entuziasmon kaj bonvolecon.

Sekve, la reprezentantoj de la Grupoj sa-



Malfermo de la Kongreso

lutis la kongreson: HEJS, Fervojistoj, Blinduloj, Amikoj de UNESKO (Barcelono), Stelo de Paco (Barcelono), Esperanto Grupo de Bilbao, Callosa de Segura, Ches-te, Grupo Jovellanos el Gijón, Madrida Esperanto Liceo, Centro de Esperanto Sa-badell, Santander, Sevilla, Tarrasa, Valen-cia, Valladolid, Paco kaj Amo el Vigo, Hispana Esperanto Katolika Asocio el Za-ragoza kaj Puentegeñil (Andaluzio), Ali-cante, k. t. p.

S-ro Zaragoza nome de ILEI —Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj -kaj de la hispanaj profesoroj de Esperanto, diris: ke jam estas la momento, ke Esperanto estu ago de ĉiuj personoj de la mondo; ke Esperanto estu en la kadro de la baza eduka-do en la lernejoj. Ĉiuj helpu nin, por ke Esperanto estu la ĝenerala lingvo de la

infanaro. Apogu la agadon, por ke la nuna jardeko estu la jardeko de la enkonduko de Esperanto en la lernejoj.

Kiel eksterlanda reprezentanto, salutis portugala samideano: "Portugalia kaj His-panio estas eternaj ĝefianĉoj, kiuj amiki-ĝas per amo. Ni deziras la instruadon de Esperanto en la hispanaj lernejoj. Vivu la hispana kaj portugala frateco!"

Ankaŭ propranome salutis franco, kiu fer-rias en nia lando, kaj fine s-ro G. Aboŭn legis telegramojn de tiuj, kiuj ne povis ĉeesti la kongreso. Post kelkaj vor-toj de nia Prezidanto s-ro A. Figuerola, S-ro Sanz, Vicurbestro de El Ferrol, salu-tis ĉiujn kongresanojn kaj diris: Por ke Es-peranto havu la necesan efikecon ne sufi-ĉas la entuziasmo, estas nepra kaj urĝa la agado de la ŝtatoj.

S-ro A. Figuerola parolis pri la gastemeco de Galegio. Galegio per sia tradicio kaj idiosinkrazio, malfermita al la dialogo, kaj kun belegaj pejzaĝoj allogas nin. Ne estas alia klarigo ol tia, ke havante Galegio la ses procenton de la hispana esperantistaro, en dek ses jaroj estis sidejo de tri esperantistaj kongresoj. Li transdonis la parolon al s-ro Lladó de la Loka Komitato, kiu diris: Tiu ĉi urbo estas lulilo de maristoj, kiuj trairas ĉiujn oceanojn. Sed ne nur estas naskiĝurbo de maristoj sed ankaŭ de militistoj, registroj, inĝenieroj, muzikistoj kaj krome tiu de la elstara verkistino Concepción Arenal. Estas senutile paroli pri belaĵoj, oni ilin povas vidi. En El Ferrol estas du grandaj ŝipkonstruejoj, kelkaj helpaj industrioj kaj pri la instruado, du institutoj, vira kaj virina, kaj elementaj metiaj lernejoj kaj artaj.

Pri la Esperanto-movado ni devas omaĝi al s-ro Oliván, vera apostolo de Esperanto; kaj mi finas per: Ni deziras al vi agrablan restadon. La Vicurbestro de El Ferrol per malmultaj vortoj, sed esperante, post la saluto al ĉiuj, inaŭguras la Kongreson.

Posttagmeze disvolviĝis la laborkunsido de la Estraro de HEF kun la Delegitoj. Oni informis, diskutis kaj rekomendis rilate internajn aferojn de nia hispana esperantista movado. Inter diversaj punktoj ni mencias la proponon de Llibert Puig: Pli grandigi la nombron de nia HEF membraro ĝis 1010 membroj, tiamaniere HEF povos efektiviĝi pli grandan aktivecon kaj samtempe elekti plian komitatanon en UEA.

Vespere okazis la akcepto de la kongresanoj en la salono de la Urbodomo. Akcep-



Gekongresanoj en la urbodomo de El Ferrol

tis nin la Urbestro kun urbkonsilantoj. La Urbestro, S-ro Joaquín González-Llanos y Galveche, salutis nin per la sekvantaj vortoj: "Tra la tuta mondo via idealo devas divastiĝi por la homaro. Ni deziras la sukceson de la Kongreso kaj agrablajn tagojn sennubajn, se la suno nin akompanas. Ni kredas, ke la Kongreso estos sukcesa".

S-ro. Figuerola nome de ĉiuj kongresanoj dankis la honoron kaj la gastemecon de Galegio. Galegio altiras nin, en ĝi estas io kio estas kunigita kun Esperanto kiel konstanta penso, pro tio ni dankas vin S-ro Urbestro. S-ro Dà Silva, je la nomo de la Kongreso kaj de la Loka Komitato, surmetis la stelon de Esperanto sur la bruston de la Urbestro, kaj ĉe la adiaŭo, la Vicurbestro invitis nin al folkloro festo en la Urboparko.

Jaŭde matene oni okazigis la Generalan Kunvenon. Tiun malfermis S-ro A. Figuerola, kaj sekve, s-ro G. Aboín legis la tagordon kaj tuj la Aktojn de la lasta kongreso en Lérida. Sekvis diskutado pri la elementaj diplomoj de Esperanto de la Federacia Ekzameno. Ili devas estis konsiderataj kiel oficialaj de la Federacio. Tamen estas konvene, ke la kursgvidantoj, je la fino de la kursoj, povu okazigi ekzamenojn, kaj estus granda ilo por propagando, se la prezidanto de tiuj ekzamenoj, estus direktoro de nacia kolegio. La diplomoj plej bone estu disdonataj okaze de kunveno aŭ renkontiĝo. Pri la ekzamenoj de la Federacio oni ilin celebros, kie ilin oni petus. La ekzamentaskojn sendos la Ekzamena Komisiono.

Estis aprobata okazigi eksterordinaran Asembleon por modifi kelkajn punktojn de la Reglamento, kaj por la venonta jaro estis proponita kiel kongresurbo, Burgos,

kaj se eventuale ne estus eble en Burgos tiam en Sabadell.

Laŭ propono de S-ro Zaragoza estis aprobata sendi telegramon al la Ministerio pri Scienco kaj Edukado petante la enkondukon de Esperanto en la duan fazon de la baza edukado kaj plie, laŭ propono de S-ro A. Figuerola, ke oficiale estu establitaj kursetoj de Esperanto por profesoroj kaj stipendioj por ili. Krome, ke komisiono persone vizitu la Ministerion por tion peti.

Oni preparolis pri la eldono de Don Kiĥoto, jam preta la esperanta traduko fare de S-ro De Diego. Oni konkludis, ke la HEF—estraro faru la demarŝojn, zorgu pri la buĝeto kaj permeson de la tradukinto, kaj pri ebla eldonado per pagita antaŭmendo aŭ per kajeroj. Ankaŭ oni diskutis pri la ebleco eldoni "Hispanan Antologion en Esperanto" jam aranĝita de S-ino Amalia Núñez Dubús.

S-ro A. Figuerola indikis, ke nia Hispana Esperanto-Federacio ĉiam kunlaboris kun UEA, kaj niaj estontaj kontaktoj kun UEA estos pli kaj pli regulaj, ĉefaj kaj intensaj. Ankaŭ li sciigis, ke laŭ la Reglamento, restas nur jaro kaj duono por lia prezidanteco. Kion ni faros? Estas konvene, ke je aprilo la HEF-anoj estu konsultataj por la konstati la majoritatan opinion; tondra aplaŭdo de la kongresanoj sigelis la parolojn de nia prezidanto.

Posttagmeze kunvenis la Redakcio de "Boletín" kun la delegitoj de la Grupoj. S-ro S. Aragay prezentis al la ĉeestantoj siajn opiniojn kaj lastajn spertojn pri la unuaj ekzempleroj, kaj informis pri la neceso trovi taŭgajn kunlaborantojn pri fotografado. Ĉar lia deziro estas bildigi ĉiujn paĝojn de HEF—bulteno, eĉ se eblas pere

Kongresanoj
 ensipiĝis por trairi
 la Ferolan
 enfluejon



de koloraj bildoj. Samtempe oni indikis la neceson trovi plian kunlaborantojn por la Komitata Redakcio, tiamaniere la ŝarĝo estos malpli peza por la nunaj membroj de K. R. Pro tio oni petis, kaj nun ankaŭ petas al la volontuloj, bonvolu komuniki siajn eblecojn al nia ĉefredaktoro S-ro S. Aragay. Oni atentigis la aŭskultantaron pri la multenombraj agadoj de la HEF-estraro kaj Redakcia Komitato dum la unuaj monatoj de ĉi-jaro, kun la celo eldoni antaŭ la Kongreso la unuajn tri numerojn de nia Bulteno; feliĉe oni sukcesis, kaj ne okazis kiel dum la antaŭa ŝanĝo de la Redakcio el Valencio al Zaragozo, ke nia membraro atendis preskaŭ duonjaron por ricevi la unuan ekzempleron. S-roj G. Moya, LL. Puig kaj V. Hernández komentis siajn respektivajn lastajn artikolojn aperitajn en HEF-bultenoj, kaj kun granda fido pri la estonteco de nia redakcia laboro, oni fermis la kunvenon.

Vespere, en la kultura aŭlo de la Ĝenerala

ŝparkaso, s-ro Camilo Fernández prelegis kastillingve pri la "la Monda Lingvo Problemo kaj la intenco de Lingvo Internacia". La preleganto disertis kun verva oratoreco, kaj komencis sian paroladon per la analizo de la teorio de la komunikado. "La komunikado estas la bazo de la socia interrilatiĝo kaj la homa komunikado estas parola, kaj kiam kultura, per skribo. La komunikado per la parolo estas nepre necesa; sen parola lingvo ne ekzistus komunikado en analfabeta popolo". Pri la teorio de komunikado, li eksponis la diversajn manierojn de komunikado, kaj en rilato al la lingva informado, li difinis ties unuon la "vitte". Li larĝe analizis la evoluojn de la lingvoj. La lingvoj antikve parolataj en Hispanio apartenis al tri popoloj: Keltoj, Iberoj kaj Keltiberoj. Dum la Romania konkero oni trudis la latinon, sed ne disvastiĝis la kultura latino, estis la kampara, kio faris, ke la antikvaj lingvoj perdiĝu. La posteulaj konkerintoj akceptis

la kamparan latinon, kaj kun la araba invado, diversiĝis la duoninsula lingvo. Tiel eliris la kastilia lingvo, la galega, la kataluna kaj restis la vaska kiel atesto de la antikvaj lingvoj en nia lando, ĉar Romio ne tute povis konkeri la vaskan montaran popolon. La kastilia lingvo, la galega kaj la kataluna ne estis dialektoj sed diversaĵoj el la latino. Post ekfloro, la galega kaj kataluna perdis gravecon sed renaskiĝis kun la Renesanco. Rosalia de Castro en Galegio, kaj Aribau, Jacinto Verdaguer, Juan Maragall kaj Carner en Katalunio, revivigis siajn gepatrajn lingvojn.

Post tiu klarigado, la preleganto alvenis al la kerno de la disertacio parolante pri la kreado de lingvo internacia fare de Zamenhof, kaj eksponis la malhelpaĵojn, kiujn Esperanto renkontas. "Estas la lukto inter la naciismo kaj la internaciismo". Li reliefigis la influon de Makiavelo en la itala unueco, kaj la ideojn de Makiavelo rilate la grandeco de la princo kaj la naciismo.

"La aktuala eŭropismo estas politika problemo. La naciismo malhepas la internacismon, kaj tial, la interkompreniĝo estas neebbla". Li menciis la diversajn lingvojn, kiuj tra la historio estis hegemoniaj: La greka, la latina, la hispana, la angla, la araba. "Oni ne povas akcepti nacian lingvon kiel internacian".


Zamenhof kreis Esperanton por ke ĝi estu helplingvo. Esperanto havas hindeŭropan fundamenton kaj estas tre facila; por lerni ĝin oni nur bezonas tri monatojn. Kial ne uzi simpligitan lingvon? Se la registaroj de la ONU rekonus Esperanton, tio estus facila, sed la registaroj ne interkompreniĝas. Pri la diversaj elprovoj de internacia lingvo menciis la Baza-Anglan, sed tiu elprovo ne estas vivopova, ĉar ne taŭgas por interparolado.

Rilate la Biblian citaĵon de laabela turo, li asertis, ke laŭ nuntempaj teologoj, Dio ne konfuzis per malsamaj lingvoj la konstruantojn de laabela turo, sed tiuj ne interkompreniĝis pro la diverseco de intereso. "Pro la paganiĝo de la homaro, Kristo malsupreniris al la Tero. Dio volis redemptori la Homaron. Kristo travivis obskuran jartridekon, tri jarojn pilgrimis kaj tri tagojn, krucumita, martiriĝis. Li petis pardonon por la homo mortiganta Dion".

"La militoj superregis la mondon: 1914, 1939, kaj la fadeno de la lastaj militoj. Sed la vivo de la homo estas milico kontraŭ malico. Via prediko por Esperanto estu konstanta, estu semo, kiu fruktos. Frateco anstataŭ milito; karitato, justeco, paco".

Vespere, je la noktiĝo, okazis folkloraludado en la urba Parko kun refreŝigaĵoj, regalo de la urbestro. Tiel bone finiĝis la dua tago de nia Kongreso.

La vendredo estis dediĉita por vizitoj kaj ekskursi. Matene ni vizitis la Arsenalon, sidejo de la hispana armeo en la norda oceana marbordo. Ni vidis kelkajn riparatajn ŝipojn en la seka digo, kaj ankaŭ gimnastikajn ekzercojn de la ŝipanoj. Poste, per aŭtoĉaroj, ni vizitis la ermitejon Nia S-ino de "Chamorro" kaj rigardis la tieajn belajn pejzaĝojn. Ĉe la strando Valdoviño ni kunmanĝadis tipajn galegajn manĝaĵojn, la galegan pastecon. Sekve ni iradis suden ĝis Puente deume, kie la Urbestro akceptis nin en la urbodomo. Li diris, ke ni faras laboron de alproksimiĝo kaj kunvivado sen landlimoj. "Estu la forto de la lingvo por vera unuiĝo. Puente deume estas la hejmo de ĉiuj. Ne estu la lasta fojo, ke vi ĉestu El Ferrol, eble vi renkontiĝos en Puente deume. Ni vere proponas tion. Kion ajn vi bezonu, ĉi tie



Ĝenerala _____
_kunveno de.
_H. E. F.

ni estas pretaj por servi Hispanion kaj la mondon”.

S-ro A. Figuerola, nome de ni ĉiuj, dankis la urbestron. De Puentedeume, ni revenis al Ferrol laŭ la marbordo tra Ares kaj la suda flanko de la ferola vasta enfluejo, kie ni lhaltis por viziti la allogan urbeton Mugardos kaj manĝeti en tipaj maristaj tavernoj.

Sabate matene, la plejmulto da kongresanoj enŝipiĝis por trairi la Ferolan enfluejon ĝis ties enirejo, kie la marakvo mallarĝiĝas, kun du antikvaj kasteloj, ambaŭflanke, gardas la enirejon. Dume, estiĝis la esperanta ekzameno, sub la prezidanteco de S-ro Andrés Alcolea kaj la ekzamenantaj profesoroj S-roj Zaragoza, Navarro kaj González del Pino. Ĝin partopronis multaj ekzamenatoj.

Posttagmeze, samtempe kun la vizito al la Specimenfoiro, okazis la kunveno de ILEI-Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj—. Oni informis pri la celo kaj aga-

do de ILEI kaj ties laboro en nia lando. “Estas konvene, ke en la kursfinaj ekzamenoj ĉeestu oficialaj profesoroj, kaj ke Esperanto estu la ĝenerala lingvo por la infanoj, kaj pro tio, ni laboru por enkonduko de Esperanto en la duan fazon de la lernado”.

Tuj sekve alvenis la kutima esperanta prelego de la kongresoj, cijare fare de S-ro Julio Juanes Sainz. Tial ke li ne povis ĉeesti al la kongreso, S-ro Llibert Puig verve legis ĝin. La temo estis “Du voĉoj de Galegio: Manuel Curros Enríquez kaj Rosalía de Castro”.

La disertacio finiĝis per galega poeziaĵo. Tial, ke la leganto S-ro Llibert Puig ne scias la galegan, li petis iun, kiu volus deklami ĝin, kaj galega kongresano bone deklamis la poeziaĵon.

Granda sonora aplaŭdado sigelis la lastan parolon de la leganto, Konsciante la Redakcio la multevalorajn enhavojn de la verko de S-ro Julio Juanes, ni rezignas, ne resume eĉ ne skize, komentarii ĝin. Ni a-

tentigas al nia legantaro, ke en nia sekvanta numero aperos entute tia prelego, kiu certe estas perlo de niaj esperantaj prelegoj.

Kaj jen, kiel ĉio havas sian finiĝon, ankaŭ alvenis la fermo de la Kongreso.

La vicprezidanto de la Loka Komitato S-ro José Tojeiro, prononcis vortojn por malfermi la ferman kunsidon, kaj S-ro D'á Silva, la senlaca laboranto por la Kongreso, bedaŭris la adiaŭon, sed feliĉe pro esti gajninta multajn amikojn kaj resti denove preta por la esperantista tasko.

Oni legis la lastajn ricevitaĵojn: de S-roj Camilo Veiga, Julio Osuna, E-Grupo Villanueva y Geltrú, Régulo Pérez kaj Hernández Yzal.

La kongreso aprobis la sekvantan rezolucion: Peti al la Ministerio de Scienco kaj Edukado:

Unue: ke ĝi stablu kursetojn de Esperanto por neesperantistaj profesoroj kaj tiujn apogu per stipendioj.

Due: ke en la duan etapon de la baza edukado estu enkondukita la instruado de Esperanto.

Por tiu peto antaŭ la Ministerio kaj fari adekvatajn demarĉojn estis komisiitaj la S-roj Régulo Pérez, Zaragoza, Manteca, R. Herrero kaj A. Figuerola.

Por la venonta Kongreso estis elektita Burgos, kaj se neblas ĝia organizado, tiam Sabadell.

Aprobis ankaŭ sendi telegramojn al la Ŝiparmeaj Ministroj kaj al Lia Moŝto la Reĝo Johano Karlo la 1-a.

S-ro A. Figuerola anoncis intervenojn: Tiun unue de la Grupo Jovellanos de Gijón. Reprezentanto de la menciita grupo, post saluto al la Kongreso honoris S-ran Santiago Mulas pro ties laboro por la esperantista movado. Li estas la Esperanta Instruisto de la Grupo kaj liaj lernantoj donacis al li gratulan atestilon.



S-ro José Pastor nome de Novelda salutis la Kongreson, ĉar li ne povis fari tion ĉe la inaŭguro.

S-ro S. Aragay parolis pri la premio Klara Silbernik — edzino de Zamenhof — Tiu premio, ĉiujare disdonata sub la kadro de la Hispana Esperanta Muzeo en San Pau D'Ordal kun la helpo de Centro de Esperanto Sabadell, konsistas en medalo kun la busto de Klara Silvernĳ, kaj per ĝi, estas premiita la oferemo de edzino por ties edzo, kiel aganta esperantisto apartenanta al esperantista organizaĵo. Tiel ke, la nunjara omaĝintino S-ino Marcelina Palomo de Figuerola pro malsano de sia edzo ne povis ĉeesti en San Pau D'Ordal, S-ino Carmen Cánovas de Puig transdonis la honoran medalon al S-ino Marcelina kaj prononcis la sekvantajn vortojn: Ĉijare estas la dua jaro de la premio kaj estis premiita S-ino Marcelina Palomo de Figuerola. Ŝi zorgas pri ses filoj, helpas la blindan ed-

zon, akompanas lin en la naciaj kaj internaciaj kongresoj. Tia abnegacio meritas omaĝon”.

S-ino Figuerola post ricevo de la medalo, pro emocio ne povis paroli, nur respondis: Dankon!. S-ro Figuerola emociis parolis. Multajn horojn de esperanta legado dediĉis lia edzino por li. La viroj ne havas tian paciencon, nur abnegacio de virino, nur ina amo povas oferi tion. Li bedaŭrante, ke ni jam estas ĉe la fino de la Kongreso, ĉar ni amas Esperanton kaj per ĝi ni povas pli bone koni la homojn. Ĝis la venonta jaro ĉe la 37-a Kongreso en Burgos aŭ en Sabadell.

Vespere, en luksa restoracio, finiĝis per bankedo la brila 36-a Hispana Kongreso de Esperanto en El Ferrol.

Sukcese antaŭen, ĝis la venonta 37-a Kongreso aŭ en Burgos aŭ en Sabadell.

La Redakcio.

SOCIOS PROTECTORES DE H. E. F. PARA 1976

24. Angel Pombrol Hernández (973)

* * *

ACLARACION

En el número de Marzo-Abril figura un donativo de 2.000 pts. para el F. A. L. P. de "Grupo Esperantista" sin indicar, por error, que era el Grupo Esperantista de Alicante.

G. F.

CUOTAS DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Dumviva Membro:

5.000 ptas. una sola vez

Socio Protector:

400 ptas. anuales

Socio Abonado:

250 ptas. anuales

Socio Numerario (sin derecho a recibir el Boletín de HEF):

100 ptas. anuales




BRILA 61-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN ATENO (Grekujo)

Hispana delegitaro, po 15 personoj, ĉeestis al la pasinta U. K. Samideanoj G. Aboín, kiel anstataŭanto de nia UEA-Komitatano A. Figuerola, L. Yzal, kiel Ĉefdelegito de UEA, kaj la subskribinto, kiel HEF—reprezentanto dum la unuaj tagoj kiam ne ĉeestis G. Aboín, agis kiel musketeroj dum la multenombraj komitatkunvenoj, ĝenerala kunsido, fakaj diskutoj, prelegoj de Internacia Somera Universitato, UEA-estraraj kontaktoj kaj pliaj aranĝoj, kiujn la L. K. K. semis dum la sep tagoj de la U. K. en Ateno.

Pro la multenombra farita agado oni raportos pli detale en la sekvontaj numeroj de nia organo "Boletín". Nun ni nur deziras reliefi ĝi ke la ĉijara U. K. plene sukcesis, ĉefe pro la granda farita laboro de la diversaj komisionoj kaj komitato de UEA.

S-ro L. M. Hernández Yzal surbendigas prelegon




Inter la temoj pritraktitaj, meritas apartan mencion "Regiona Agado" —regionaj kontinentoj kie ne ekzistas Landa E-Asocio—. Nova statuto de UEA, —post la diskutado pri la ĉefaj punktoj ankoraŭ mankas pliaj kontaktoj inter la komitatanoj por fini poluri la novan statuton.— Do, resume, laŭ niaj propraj spertoj, ni opinias, ke nia U. K. estas tre necesa kaj utila, ĉar ĝi estas la unika vere tutmonda esperanta aranĝo, kie oni permesas multflankajn kontaktojn inter la esperantistaro sub la grandioza neŭtrala etoso. Pro tio, kiam ni konstatas, ke eĉ dum la ĉi-jaraj olimpikoj en Kanado politikaj nuancoj enpenetris en la sportkonkursojn, estas vera ĝojo vivi dum sep tagoj en sincera esperanta rondo.

La subskribinto ne deziras fini ĉi enkondukon antaŭ ol rakonti unu el la aranĝoj plej simpatia kaj agrabla: Ĝi estis sendu-

ble la urbestrara akceptado fare de S-ro Johano Papateodoru, urbestro de Ateno, al la kongresanoj en la urbodomo dum la 6-a de aŭgusto. Li tre elokvente montris sian entuziasmon kaj intereson pri niaj U. K., sed kiam oni transdonis al li honoran medalon de "Helena Esperanta Asocio" por celebri ĝian 50-jaran fondiĝon, tre emocia kaj kortuŝita dankis al la ĉeestantoj tiun donacon, kaj certigis ilin ke li certe ĉeestos al la venonta U. K. en Islando. Sekve, nome de la urbestra konsilantaro li donacis memorreliefojn al la estraranoj de UEA kaj al la Prezidanto de la Akademio de Esperanto.

S. Aragay.

Sekve oni publikigas la rezoluciojn de la 61-a U. K. de E. kaj la saluton de S. Aragay nome de nia Landa Asocio okaze la malfermo de la Kongreso.



La antikva urbo kaj sanktejo Delfi

61-a universala kongreso de esperanto

Ateno, 31-07-1976 — 07-08-1976

Rezolucioj

Rezolucio 1:

La 61-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Ateno, Grekujo, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1976 kaj diskutinte kiel ĉeftemon La Internacian Kunlaboron de Ŝtatoj sur Regiona Nivelo;

notas

1. La kreskantan kaj salutindan kunlaboron inter ŝtatoj en samaj geografiaj regionoj;
2. La ofte esprimitan deziron de la ŝtatoj en samaj regionoj evoluigi siajn interrilatojn per pacaj rimedoj kaj en harmoniakunlaboro, anstataŭ per konfrontiĝo kaj malmikeco;
3. La antaŭvideblan intensiĝon de tiuj regionaj interrilatoj en la estonteco;

atentigas

1. Ke esenca elemento en la ĝusta kaj justa rilatado de la ŝtatoj estas egaleco de lingvoj, kiel nun penas apliki certaj internaciaj regionaj organizoj;
2. Ke tiu lingva egaleco estas tre multekosta kaj neefika se ĝi ne estas atingata per punta lingvo, kiu neŭtrale ligu la diversajn ŝtatojn-membrojn;
3. Ke la neŭtrala kaj esprimkapabla Internacia Lingvo Esperanto reprezentas idealan tian pontan lingvon, taŭgan por oficiala utiligo en internaciaj organizoj;
4. Ke Esperanto, pro sia facila lernebleco ankaŭ aparte bone taŭgas por senpera kontaktado inter la ordinaraĵ civitanoj de najbaraj landoj;

kaj alvokas

1. Al la diversaj internaciaj regionaj organizoj, ke ili studu le eblecon utiligi Esperanton kiel lingvon de dokumentado kaj eventuale lingvon de administrado kaj debato, kaj ke ili antaŭenigu ĝian utiligon en la propaj regionoj;

2. Al la diversaj ŝtatoj, ke ili antaŭenigu la instruadon kaj utiligadon de Esperanto por ĉiaj homaj kontaktoj inter lingvaj grupoj el la koncernaj regionoj;

3. Al la regionaj organizoj kaj la unuopaj ŝtatoj, ke ili komune realigu la jam ekzistantajn interkonsentojn kiuj celas faciligi la homan kontaktadon trans naciaj limoj kaj la redukton aŭ eliminon de lingvaj baroj aŭ lingva diskriminacio.

Rezolucio 2.

La 61-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Ateno, Grekujo, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1976, notas, ke la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko) festos la 4-an de de novembro 1976 la 30-an datrevenon de sia fondiĝo.

Gratulante al Unesko je tiu okazo, la Kongreso timarkas kun danko kaj atento la gravan laboron faritan de Unesko dum tiu periodo, kaj deziras al ĝi daŭran sukceson en la antaŭenigo de la edukado, scienco kaj kulturo je tutmonda skalo.

Rezolucio 3.

La 61-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Ateno, Grekujo, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1976, diskutis kiel "internan" ĉeftemon la demandon "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto?" Ĝi notis, ke antaŭ ĝuste dudek jaroj, la 30-an de julio 1956, reprezentantoj de la Informaj Fakoj de UEA, en kunveno en Frostavallen, Svedujo, akceptis Fundamentan Principaron de Informado pri la Internacia Lingvo, kiu fariĝis ŝlosila dokumento en la informaj metodoj de UEA kaj la Esperanto-movado ĝenerale. Tiu Principaro de Frostavallen, kiu enkondukis novan periodon en la Esperanto-informado kaj unuafoje kodigis la plej gravajn principojn, restas aktuala ankoraŭ hodiaŭ.

La Kongreso rekomendas al la Esperanto-organizoj je ĉiuj niveloj, kaj al la unuopaj parolantoj de Esperanto, daŭrajn evoluigon kaj aplikon de modernaj kaj trafaj metodoj de informado kaj regulan interŝanĝon de materialoj kaj ideoj sur tiu kampo.

SALUTO DE S-RO ARAGAY NOME DE H. E. F.

Estimata Prezidanto, estraranoj, gekongresanoj: Je la nomo de Hispana Esperanto-Federacio kaj je mia propra, salutas vin kaj transdonas de nia Prezidanto, sincere rajn bondezirojn al ĉiuj.

Pro la historio de UEA kaj de niaj Universalaj Kongresoj, niaj estraranoj meritas nian helpon kaj kunlaboron; sed nun, kiam mi konstatas la lertan gvidadon de la nuna estraro dum la lastaj jaroj, konvinkiĝis mi, ke ni ĉiuj devas ankoraŭ pli efike, serioze kaj akurate kunlabori kun la organoj, komisionoj kaj estraranoj de UEA, ĉar ili gvidis kaj gvidas nian estimatan Universalan Esperanto-Asociacion diligente kaj sukcese. Dankon!

postmorta omaĝo

Al s-ano Antoni CRIACH



*Sur via brusto la kvinpinta stelo
emajle verda, brilis pro pasi':
polusa stel' de homarana celo
kiun atingis plej fervore vi!*

*Vi rangis kun fiero interfrata
el samideaneco sen makul'
—komuna idealo plej amata—
ĉar vi neniam estis naivul'.*

*Ho, jes! Vi ĉiam tretis firman grundon
kaj vigle paŝis kun aplomb' kaj ĝoj'.
Vi serĉis la profiton kaj la fundon
de rezonado laŭ plej rekta voj'.*

*Restas de vi lum-spur' el viaj jaroj
de mecenato, instruist', amik'.
Portreto via —kiaj blankaj haroj!—
bildiĝas, juniĝante, kun efik'.*

*Ni devas laŭdi vin jam epitafe,
ho ve! ĉar ni priploras vin hodiaŭ.
Jen, vin la mortfalĉilo batis trafe.
Svingiĝas alte dekstra man': —Adiaŭ!*

S-ro Antoni CRIACH naskiĝis en la urbeto Castellar del Vallés (Barcelono), kiu estas ankaŭ mia naskiĝloko. En Ilerdo, okaze de la XXXV-a Hispana Kongreso de Esperanto, ĉar ni havis la reciprokajn ŝancon mulfoje konversacii, mi demandis al li ĉu li trafis koni mian tiean familion. Li ĝoje respondis al mi jese, kaj li tuj konfirmis sian aserton per multaj kaj konkretaj detaloj.

Jen, do, plia motivo por ke mi, persone kaj solidare, omaĝu lin postmorte kun profunda bedaŭro.

Gabriel MORA i ARANA



*“La morto ne estas
ne povi komunikiĝi,
sed ne povi plu esti komprenita”.*

PASOLINI

Kun klara menso li atendis sian vivofinon, kaj tial li intencis komprenigi al ni sian malrimon pri la tuja alveno de la lasta horo. Tio plene konfirmiĝis al ni pro la jam neevitebla forpaso lia.

Laŭ sokrata agmaniero li prikonsilis, karesis kaj adiaŭis la de li amatajn familianojn. Dum la daŭro de nur kelkaj momentoj lia korpo kvietiĝis; kaj la malsano, pli kapabla ol la menso, senvivigis kaj forprenis lian naturan kaj serenajn mienon.

Li ĉiam amis profunde, ĝis la lasta sekundo, nian esperantan flamon. Nun, kiam ni ne plu povas aŭskulti lian parolon, ŝajne ni ankoraŭ aŭdas, ĉirkaŭe kaj ĉiuloke, liajn vervajn konsilojn rilate nian karan Esperanton.

Tragike la homara vivo daŭras, sed, same kiel li, ni ankaŭ mortos. Intertempe, ni ne plu povos komunikiĝi kun li, sed li firme kredis ke lia esperantisma semo ĝermos kaj kreskos en ni, kaj ke ĝi, ĉe ni, konstante reproduktiĝos inter niaj idoj.

Lia nevo: S. ARAGAY

HEJS-UMADO ĈE HISPANA KONGRESADO

Bonvolu pardoni la adasisman titolon. Nu, la lastan nacian kongreson, inter amaso da plenaĝaj kaj maljunaj esperantistoj, aŭ, pleje, "simpatiantoj", ĉeestis ankaŭ junaj homoj, kiujn ankaŭ oni devas dividi en tiujn du kategoriojn.

Pro diversaj kaŭzoj, inter kiuj ĉefaŝ la manko de specialaj programeroj por la junularo, kaj la neekzisto de tiucela varbado-aferoj ambaŭ pri kiuj HEJS plene kulpas—iom malpli ol dudeko partoprenis, venintaj el Madrid, Barcelona, Valencia, Pontevedra, Coruĝa, Alicante, Sevilla, Córdoba, Vizcaya kaj el la kongresa urbo mem. Gratulindas la madrida grupo, la Liceo, kiu sendis plurajn reprezentantojn; tio montras ilian vigecon kaj interesiĝon. Des pli inda je danko kaj gratulo estas la Ferrol'a junularo, kiu, malgraŭ grandaj malfacilaĵoj, sukcesis iomete lerni la Internacian Lingvon, kaj entuziasme kaj sindone okupiĝis pri la kongresaj aferoj.

Nu, kompreneble, ĉiuj gejunuloj regule kuniradis, kaj ne mankis al ni la plenumo de tipa galega rito: la Queimada. Jes, ĉe stelplena nokto, apud la ruinoj de fortikaĵo, je la konvena horo por konsento de ĉiuj gesorĉistoj kaj ĉeteraj noktaj spiritoj, flamo ekbruligis la brandon, kion akompanis kantado de la galega himno, sekvita de la kataluna kaj vaska. Finan punkton metis "La Espero", laŭ nova melodio, pli alloga por niaj oreloj.

Kvankam kunvivado de junaj hispanaj esperantistoj estas ja iaspeca HEJS-umado, okazis kunveno al kiu pli ĝuste decas tia nomo. Ĉe poŭpo de boato, kiu nin transportis al San Felipe, oni parolis, por informo de la nesciantoj, pri la strukturo de la monda kaj nacia movado kaj HEJS. La madridanoj, kiuj okupiĝas pri la organizado de nia III^a HEJS—tendaro, detale prezentis siajn projektojn por ĝia okazigo. Danke al tiu ĉi kunveno, nia membronombro spertos bonvenan kreskon, kaj espereble la ĉeesto al la venontjara tendaro estos senprecedence amasa. Tiel estul.

Miguel Angel Altuna.



PRI LA 8-a FRANCA—HISPANA ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN TARBES KAJ LOURDES

28 — 30 de Majo 1976

Du tagojn niaj hispanaj esperantistaj geamikoj ne multe estas, se oni konsideras nur la daŭron, sed kian grandvalorecon oni malkovras, kiam oni rigardas la kvaliaton de tiuj tagoj! Ĉar ni ankoraŭ neniam partoprenis renkontiĝon kun alilandanoj, mi iris al Tarbes, nesciante tion, kion mi malkovros, sed nun mia opinio ne plu estas objektiva, tiel forte la etoso de tiu renkontiĝo entuziasmigis min. Pripensante tiun sabaton, kelkajn tagojn poste, la memoraĵoj estas tiel multaj, ke mi parolos nur pri kelkaj impresoj.

Ni komencis nian tagon vizitante en Tarbes la katedralon, pri kiu la klarigoj de nia gvidanto, Jakobo Decobert, estis tre utilaj, ĉar eĉ la Francoj ne bone konis tiun monumenton, fare de la tre freŝdataj prifosaĵoj. Poste, ni piediris ĝis la Foiro-Ekspozicio kaj, ĉar la vojiro estis iomete longa, ni havis tempon konatiĝi kun la grupanoj. Persone, mi spertis la deziron de ĉiuj konatiĝi kun la novuloj, kaj la paciencon de ĉiuj, aŭskultante tiujn, kiuj ne parolas tiel flue kiel ili, ĉar ni devas substreki, ke niaj gastoj aŭ el Bilbao aŭ el Zaragoza, plejparte, parolas tre fluan esperanton. Babilante, ni vizitis unu horon la multajn kaj interesajn budojn de la Foiro.

En la Foiro mem sekvis la akceptado de la Prezidanto de la Foiro kiu bonvenigis la grupanojn; ĉar ni havis tradukinton, la Hispanesperantistoj ŝatis tiun prelegeton, sed ankoraŭ pli plácis al ili la bonega ĉampano, kiu finis fluidigi la lingvon; do, ni estis tre vervaj dum la tagmanĝo en la restoracio de la Foiro.

Poste, ni iris aŭtobuse viziti la famkonatan ĉevalbredejon, kie ni admiris tre belajn virĉevalojn; ni daŭrigis niajn vizitojn promenante inter la florbedoj bone prizorgataj de la ĝardeno Massey. Rigardataj de la orgojlaj pavoj radoparadantaj, ni eniris la Muzeon, kie ni malkovris pentraĵojn de la diversaj disciplaroj: hispana, nederlanda, franca, flandra, itala . . .

Ĉiuj scias, ke vizito de Muzeo estas laciga, kaj ĝis la vespermanĝo ni profitis liberan tempon ripozi babilante, krom la plej kuraĝuloj, kiuj vizitis la vendejojn de la urbo. Mi opinias, ke tiuj kvietaj momentoj estas tute necesaj, ĉar estas tiam, kiam oni pli bone konatiĝas kun la aliaj esperantistoj. Persone, tiam mi malkovris la paroleblecon de nia lingvo, kiam mi konstatis la altnivelon, kiun ni atingis, diskutante pri tre diversaj temoj; kaj mi sentis, ke, eĉ se ĉiuj ŝajnas ĝojaj —la hispanaj kantoj certe pravas tion—, tiuj, kiuj konis la enlandan militon kaj eĉ la junuloj, kiam ili parolas pri la internaj politikaj aferoj, estas tre maltrankvilaj pri la estonteco de la hispana lando.

PRI LA 8-a FRANCA--HISPANA
ESPERANTISTA RENKONTIĜO
EN TARBES KAJ LOURDES

Mi konstatis ankaŭ alian aĵon: mi neniam aŭdis krokodiladon, precipe kiam la francaj esperantistoj parolis. Tre bone. Sed la Francoj estis tiel malmultaj!! Kvin aŭ ses meze de pli ol kvindek aŭ sesdek Hispanoj! Mi ne scias ĉu la kvalito estis, sed almenaŭ la kvanto ne! Mi opinias, ke tiuj, kiuj bonvolis vojaĝi ĝis Tarbes, ŝatus renkonti pli da Francoj, des pli, ke la renkontiĝo estis ĉe ni.

Tamen, nia vespermanĝo en la restoracio "Edelvejso" baniĝis en varmega etoso. Tie vizitis nin la gazetoservo. J. Kl. Bourgeat, Gersa amiko, kaj fervora adepto de la Freinetpedagogia movado, prezentis al ni la libreton, en kiu siaj lernantoj esperant-lingve rakontis historieton ilustritan per koloraj desegnaĵoj. Post la manĝo, grupo de gejunuloj vestitaj per tradiciaj kostumoj, ŝatigis al ni la folklorajn dancojn, antaŭ ol Bernardo Macaigne projekciis diapozitivojn pri la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Eindhoven kaj pri la Franca-Hispana Renkontiĝo pasintjare en Huesca. La tuta vespero pasis en korvarmiga bonhumoro, kiu konkretigis per ĝojaj kantoj dum nia reiro al la hotelo.

Kiam mi pripensas renkontiĝon tiel riĉa, mi vekas svarmon da ĝojdonantaj memoraĵoj, kiujn ni esperas pliigi, kiam niaj gastoj estos niaj gastigantoj. Do ĝis venontjare en Hispanujo!.

Marie-Francoise Marein.



—Folkloro prezentado—

PRI LA 8-a FRANCA—HISPANA
ESPERANTISTA RENKONTIĜO
EN TARBES KAJ LOURDES

Ĉar F-ino Marein povis partopreni la Renkontiĝon nur sabate, mi kompletigis ŝian simpatian raporton.

Vendredon, post komuna vespermanĝo en restoracio “Le Meridien”, je la 21-a h. en salono “Le Parvis”, okazis publika prelego pri Esperanto en franca lingvo. S-ro Decobert bone kaj elokvente prezentis al la neesperantista publiko la valoron de la Internacia Lingvo. Esperanto, li diris, estas la nura solvo por la lingva problemo en la mondo, ĝi facile komprenebla unuigas la homojn kaj kreas lacojn de homa amikeco. Je la fino li prezentis dokumentojn pri la Internacia Lingvo. Varma aplaŭdado premiis la interesan paroladon de nia elstara samideano.

Dimanĉon mantene, je la 8-a, ni kolektiĝis en la preĝejo “Sankta Anna”, kie Pastro P. Fuentes Valbuena, de León, celebris la Meson kaj predikis en Esperanto.

Je la 9-a ni ekveturis al Lourdes. Kiel programite ni vizitis la Pirenean Muzeon -elmontro de vivo en malnovaj tempoj—; la tombon de Pastro Emile Peltier, esperantista pioniro; en la tombejo, Pastro Fuentes Valbuena gvidis la preĝon por la mortintoj, en Esperanto, kaj tuj sekve, ni vizitis la Sanktejon.

Fine, je la 14-a ni renkontiĝis en centra restoracio “Bela Napolulino”, kie okazis la “Ĝis-la-revid’Bankedo” en tre agrabla etoso. Je la fino, S-ro Decobert dankis al la ĉeestantoj ilian partoprenon en la Renkontiĝo, ĉar dank’ al tiu partopreno, same la aŭtoritatuloj, kiel la ĝenerala publiko en Tarbes kaj Lourdes povis konstati ke Esperanto estas vere vivanta, praktika, internacia lingvo. Respondis la Prezidantino de la Hispana Turisma Esperanta Sekcio, kiu tuŝis la punkton pri la organizado de venontjara Renkontiĝo, kaj dankis al niaj francaj samideanoj la belan, bone organizitan akcepton; speciale al nia vigla kaj simpatia amiko Jacques Decobert, vera animo de tiuj Renkontiĝoj en Francujo.

La tempo rapide pasas kaj je la 6-a vespere, kun bedaŭro ni devis meti finan punkton al nia frateca kunestado.

La ĵurnalo de Tarbes enoncis la Renkontiĝon kaj raportis pri ĝi. La celo de niaj renkontoj estas disvastigi Esperanton per la praktiko, vigligi la movadon kaj plifirmigi la amikecon inter la esperantistoj de ambaŭ flankoj de la Pireneoj; ĝis nun, pli mapli, ni atingis la celon, espereble Tarbes ne estos escepto.

Plej amike kaj ĝis ĉiam!!!

Inés Gastón.

DONATIVOS PARA EL BOLETIN

Suma anterior 7735

| | |
|--|-------|
| Suma anterior | 6.385 |
| Julio Carulla Tella | 50 |
| Clemente Mozas López | 50 |
| Miguel Martínez | 25 |
| Agustín Moneo Montoya | 50 |
| José Requena González | 50 |
| Esperanto Klubo Payá (Mislata): | |
| Rosita | 25 |
| Amanda | 25 |
| Amparín | 25 |
| Adelita | 25 |
| Concheta | 25 |
| Lolín | 25 |
| Vicen | 25 |
| Carmen | 25 |
| Vicen Peña | 25 |
| Juanita | 25 |
| Pilar | 25 |
| Josefa | 25 |
| Amparito | 25 |
| Margarita | 25 |
| Ana María | 25 |
| Ramonet | 25 |
| Juanito | 25 |
| Amador | 25 |
| Elena | 25 |
| Félix | 50 |
| Lozano | 100 |
| Giménez | 50 |
| Párraga | 50 |
| Joll | 100 |
| Julio | 25 |
| Enriquito | 50 |
| Forés | 50 |
| Forés (eléctr.) | 50 |
| Deveses | 25 |
| Vicente | 25 |
| Maroto | 25 |
| Mateu | 50 |

| | |
|------------------------|--------------|
| Ruiz | 25 |
| Modesto | 50 |
| Ruz | 100 |
| Rafelet | 50 |
| Roberto | 200 |
| José | 100 |
| Iasías | 25 |
| Hilario | 50 |
| Sanchís | 50 |
| Jaurés | 25 |
| Mellado | 25 |
| Albero | 25 |
| Jesús | 25 |
| León | 25 |
| Leopoldo | 25 |
| Ballester | 25 |
| Alcantarilla | 25 |
| Faz | 30 |
| Blanes | 100 |
| Total | 8.715 |

DONATIVOS PARA EL F. A. L. P.

Fondo para la adquisición del local
en propiedad

Suma anterior 565.642

| | |
|---|-------|
| Donante anónimo (Vigo) | 1.000 |
| Félix Navarro | 500 |
| Salvador Aragay | 2.000 |
| Pedro Nuez | 1.000 |
| Marcelina Palomo de Figuerola | 1.000 |
| Hispana Esperanto Auroro | 1.000 |
| Francisco García | 500 |
| Mariano Izaola | 500 |
| Julían López Morales | 500 |
| Cecilio Olalla | 5.000 |
| II—a HEJS—tendaro | 2.200 |

Suma y sigue 7735

Total 580.842

SEKRETARIA RAPORTO PRI LA LABORO REALIGITA DUM LA TEMPO EKDE LA UNUA DE JULIO DE 1975 ĜIS LA TRIDEKA DE JUNIO 1976

La Estraro de H. E. F. ree prezentas, dum la Nacia Kongreso de Esperanto, al la Ĝenerala Kunveno de H. E. F. la jaran sekretarian raporton.

Je la fino de la pasinta jaro eksiĝis la Vicsekretario S-ro Héctor Figuerola pro sia milita servo, ankoraŭ ne eblis trovi anstataŭanton por tiu posteno.

Ni komencu la trarigardon de la realigoj per la instruado de Esperanto, du kvaronjaraj elementaj kursoj estis gvidataj de S-ro Ibañez en la Centra Sekretariejo. Ankaŭ la plimulto el la lokaj, provincaj aŭ fakaj grupoj rilataj al la Federacio faris kursojn. Oni sukcesis eldoni la adresaron, jam de longe atendita kaj ni esperas ke ĝi estos utila kaj helpema por ĉiuj hispanaj samideanoj.

Rilate ekstera informa agado estas rimarkinde du radielsendoj en la Nacia Radio kies daŭro estis 30 kaj 15 minutoj, partoprenis S-roj Figuerola, Flores kaj F. Gómez. Alia mallonga elsendo okazis en Madrida Radio kun intervjuo al S-ro Figuerola.

Oni aranĝis prelegojn okaze de la zamenhofa tago, S-ro Franciscop Azorín pri "De Babel al Bialystock" kaj S-ro Ángel Figuerola pri "Du elstaraj homoj: L. Braille kaj L. L. Zamenhof."

La ĵurnaloj kaj gazetoj ofte pritraktis esperantistajn temojn, ni dankas al la samideanoj la sendojn de tranĉaĵoj aŭ fotokopioj, kiuj sciigis nin pri tiu interesa afero. Nun ni rigardu la aktivaĵojn de la diversaj sekcioj kaj servoj de la Federacio.

BOLETIN: Nova epoko komencis, sub la Direktorino S-ino Carmen Payá Mira kaj la Redakcia Komitato kiu estras S-ro Aragay. La prokrasto ĉe la eldono kaj dissendo malgrandiĝis kaj espereble aperos regule, nuntempe oni sendas la trian numeron.

FERVOJISTA SEKCIO: Organizis la 17-an Internacian Skisemajnon en la kataluna pirinea montaro, dum la tagoj 8-13 februaro 1976.

JUNULARA SEKCIO: Estas menciinde la plibonigo de "HEJS—bulteno" kaj la "2-a HEJS Tendaro en Santander de la 15-a ĝis la 18-a de aprilo.

TURISMA SEKCIO: Kiel aliaj jaroj organizis Franca-Hispanan Esperantistan Renkontigon, ĉi jare okazis en la franca urbo Tarbes la 28-an / 30-an de majo.

HISPANA ESPERANTO—AŬRORO: Oni daŭrigis disvastigante la internacian lingvon inter la hispanaj blinduloj, per kursoj aŭ kun la helpo de la fonoteka servo.

ELDONA FAKO: Ne estis eble la eldono de novaj verkoj. Pro tio oni dissendis nur el la jam verkitaj.

FONDUSO ESPERANTO: La Patronaro ne povis disdoni la tradiciajn premiojn, ĉar neniu konkuris ilin, bedaŭrinde.

LIBROSERVO: Krekis la vendado de esperantaj libroj ĝis atingi preskaŭ 100,000 pesetojn.

Fine mi dankas la helpon de ĉiuj kiuj laboris pro nia Federacio kaj nia kara lingvo Esperanto.

JOSE M.a GONZALEZ ABOIN

SEKRETARIO DE H. E. F.

61-a-UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO



D-RO BORMANN DUM LA MALFERMO